

El la oktobra numero de *Literatura Foiro*
citaĵoj el raporto de Ed Borsboom
pri intervjuo kun Wilhelmus Manders
Radioprelego de Claude kaj Andrée GACOND, SRI 735, 1977.11.09 & 11 & 12

Cl.- Parolas gesinjoroj Claude kaj Andrée Gacond.

La oktobra numero de *Literatura Foiro* pere de artikolo de Ed Borsboom interese raportis pri intervjuo kun doktoro Wilhelmus Manders, pioniro de interlingvistiko. Ni hodiaŭ citas erojn el tiu ĉi teksto.

A.- Sinjoro Borsboom tiel priskribas sian renkontiĝon ĉe la pordo de la hejmo de doktoro Manders:

Cl.- « *Salutis min ĉe la pordo de sia loĝejo malaltstatura, iom svelta, bruneta persono kun ne tre grandaj sed akretaj okuloj, al kiuj nenio ŝajnis kaŝebla. Feliĉe mi ne estis antaŭe rigardinta en **Enciklopedio de Esperanto** lian portreton, ĉar ĝi montras longan, fortikan blondemulon, en plena kontrasto kun la reala aperaĵo.*

A.- Manders tuj eksplikis, ke li **neniam sendis foton al Literatura Mondo kaj ke ili en Budapeŝto metis la foton de iu nekonato**. La eraro regule siatempe naskis embarason dum prelegoj dise en Nederlando. La organizintoj de tiaj vesperoj staris antaŭ la enirejo de la salono por akcepti la fortikulon, dum Manders interne vane serĉis la invitinton. [...]

Cl.- *Wilhelmus, Johannes, Arnoldus Manders naskiĝis la 24-an de aprilo 1910 en Venlo, urbo en la suda parto de Nederlando. Tie li ankaŭ vizitis la gimnazion kaj post la akiro de la abiturienta diplomo en 1929 enskribis sin en la universitato de Nijmegen por studi grekan kaj latinan lingvojn. La brila studento estis kontraŭ Esperanto, **kiel oni povas en junaĝo esti sen iu ajn motivo tute kontraŭ io**. Sed amiko enmanigis al li en 1930 lernolibron de la internacia. Li jam tiam posedis sciencan mensostaton, nome objektive prikonsideri faktojn antaŭ ol finjuĝi aferon. Kaj neatendite, Esperanto absorbis lin, li decidis ekstudi. Li faris pli. Proponis al fama nederlanda entrepreno, Thieme, eldoni la Odiseadon de Homero en Esperanto.*

A.- *Thieme interesiĝis, sendis kontrakton kaj la studento subskribis. Plej laste en 1932 li liveru la definitivon manuskripton. Du pezaj jaroj de studado kaj tradukado: la freŝvarbito multon lernis, speciale de la nova lingvo. Retrospektante, li konfesas, ke **la proza elgrekaĵo ja estis la produkto de juna aŭdaco kun tro da eraroj**. Ne, li ne permesas represon, kvankam la libro estas rara objekto. El la mil presitaj ekzempleroj antaŭ la mondmilito pro kareco malmultaj vendiĝis kaj dum la milito pereis la resta stoko de Thieme pro bombardado. **Fakte oni devus retraduki ĝin, sed kompreneble metrike**, suspiras Manders. **Ne, mi ne konsultis, eĉ ne konis Iliadon de Kofman, nur kunutiligis prozan nederlandan tradukon.***

Cl.- *En 1932, kvar jarojn antaŭ ol li finis sian studon de la klasikaj lingvoj, la juna filologo trovis denove lokon en la gimnazio de Venlo, nun kiel instruisto.*

A.- *Tuj post la studofino li planis doktoran tezon pri iu Esperanta temo. Lia profesoro ne volis aŭdi ion pri planlingvoj, kaj instigis lin al alia esploro. Certe kun bedaŭro Manders eklaboris. Sed subite post jarduoj lia profesoro mortis. La doktorkandidato faris kontrakton kun Gerlach Royen, tiutempe renoma lingvisto en la Utrecht-a universitato. Tiu ĉi ne*

kontraŭstaris la originan temoplanon por la tezo, sed postulis iun rilaton inter pluraj artefaritaj lingvoj.

Cl.- *La milito intertempe eksplodis kaj Esperanto fariĝis eĉ en Nederlando danĝera lingvo. Iun belan tagon en 1941 sonorigis ĉe la pordo du germanoj de la sekureca polico kaj anoncis inspekton de la biblioteko de Manders. Antaŭ la konsternitaj okuloj de la familianoj la rabistoj konfiskis la Esperantajn librojn kaj la pli malpli pretan malnetaĵon de la tezo kun ĉirilataj notoj kaj resumoj.*

A.- *Nun pli sekrete la tezverkisto surpaperigis tion, kio jam estis en lia kapo. Tuj post la militfiniĝo, G. Royen juĝis kaj kondamne forstrekis la plej grandan parton el la skribaĵo : **Mi tute ne volas Esperantan propagandon. Se vi havas kuraĝon, reskribu la tuton, sed science.** Tio okazis kaj en 1947 la libro fine estis kronita per laŭdo.*

Cl.- *La publikigo de **Vijf Kunsttalen** (eldonisto Muusses prizorgis komercan eldonon en mil ekzempleroj, rapide disvenditaj) estis mejloŝtono el du vidpunktoj.*

A.- *Unue [...] ĝi donis ne takseblan moralan apogon al la propagandistoj, kiuj vane tiam klopodis penetri en pli intelektajn tavolojn. Ja estis pruvite, ke ankaŭ alia speco ol poŝtmarkkolektantoj okupiĝas pri Esperanto.*

Cl.- *Due, ĝi malfermis la pordpn al tiutempa nova tereno de la lingvoscienco, al la tiel nomata interlingvistiko. La plej granda merito de tio estis la eliro el la propra fermita Esperanto-cirklo kaj la faciligo de rilatoj kun planlingvemuloj aŭ lingvo-interesiĝantoj ĝenerale. [...]*

A.- *En 1950 kune aperis kelkaj eseoj ree ĉe Muusses sub la titolo **Interlingvistiko kaj Esperantologio**. La lingvisto enkondukis ambaŭ novajn lingvistikajn branĉojn, klare difinis la nociojn kaj demonstris la neĝustaĵojn ĉe tiuj, kiuj jam iom estis pritraktintaj la temojn. Trafas la leganton krome aŭ unualoke la ekstreme pura kaj travidebla stilo de la verko. [...] »*

Cl.- *Vi aŭdis prelegon el Svislando. Parolis gesinjoroj Claude kaj Andrée Gacond. Ĝis reaŭdo !*